

INTERNACIA SOCIA REVUO

MONATA ESPERANTA GAZETO, INTERNACIE REDAKTATA
:- PRI ĈIO, KIO INTERESAS LA HOMARAN VIVADON. :-

Sendu ĉion, kio rilatas al la Redakcio kaj Administracio al **W. NUTTERS**, Ostadestraat 94, Amsterdam, Nederlando. :- :-

ABONO: jare 1 Sm. (holande: 1 gulden 20 cent), duonjare $\frac{1}{2}$ Sm. Helpabono: jare almenaŭ 2 Sm. Konto ĉe la Ĉekbanko. :- :-

Pardonon por tiu ĉi numero!

K-doj, por forigi almenaŭ kvanteton el la plej urĝanta kaj ne prokrastebla materialo, redakcio kuraĝis aperiĝi intertemperon numeron de nia Revuo.

La administranto petas al tiuj kamaradoj, kiuj kutimas ricevi la gazeton de agento, ke ili aĉetu tiun ĉi numeron kiel ordinare; kaj al la aliaj abonantoj: ke ili trovu rimedon pagi aparte tiun ĉi eksterordinaran numeron.

Turkujo kaj Turkoj.

Dum nia lasta kunveno de Esfio, okaze de la kuraĝa kaj nobla letero de Pierre Loti, favora al Turkujo, mi donis kelkajn impresojn, kiujn mi kolektis antaŭ longa tempo, dum pli ol kvinjara restado en Konstantinoplo kaj Turkujo. Vi ilin trovis tiel malsamaj je ĉio, kion oni kutime pensas kaj diras pri Turkujo kaj Turkoj, ke vi min insiste petis skribi por vi kelkajn notojn. Mi cedas al viaj deziroj, malgraŭ ke tiuj memoraroj estas tre malnovaj, ĉar mi forlasis Turkujon en 1885. Sed ĉe mi ĉiam restas vivanta la impresoj tiam produktita sur mian junan socialistan spiriton de la sociaj turkaj moroj, kaj ĉiam restas vibranta, kie! la unuan tagon, mia profunda admiro kaj sincera amo por la loĝantoj.

Kaj tiuj sentoj estas samaj ĉe ĉiuj, kiuj vivis en tiu lando kaj klopodis funde esplori turkan karakteron. Ĉiuj unuanime ŝatas kaj amas la Turkojn, kaj estas pretaj defendi ilin kontraŭ iliaj balkanaj malamikoj.

Nia triviala esprimo „Turka kapo” — realigita en foiroj per tiu en turbano envolvita ligna kapo, sur kiu estas frapata kun

maralegoj, — tute karakterizas nian okcidentan spiritostaton koncerne la Turkoj. Ĉiuokaze oni frapas sur la Turkon, trafe, maltrafe, senmotive, kiel sur la „Turkan kapon” de niaj foiroj, por amuzigi, ekzerciĝi aŭ montri sian forton.

Ekzistas por tio du kaŭzoj.

La unua estas religia. Ĉiam por la okcidentaj kristanoj Turko restis la herezulo, idolano kaj malbenito; kaj laŭ proklamoj de la estroj de la balkanaj ŝtatoj mem, nuna milito estas pli religia milito, venĝo de Kruĉo kontraŭ Duonluno, ol milito de rasoj kaj naciecoj.

Dum multaj jarcentoj kristanaj diplomatoj kaj historiistoj nur kalumniis kaj malgloreĝis la Turkon; kaj ni tiel penetrigis de tiuj malamikaj sentoj, ke eĉ la nunaj skribistoj la plej liberigitaj de religia jugo kaj de iu dogma antaŭjuĝo, posedas interne, senkonscie, instinktan rasan heredajon, kiun jarcentoj da eraro kaj malsincereco en ili postlasis, kiu igas ilin neŝati la Turkojn.

La dua kaŭzo estas nescio. Inter ĉiuj, kiuj parolas pri Turkujo, ⁹⁹100 parolas ne sciante, nur ripetante kiel papagoj, kion ili aŭdis aŭ legis, ĉu en gazetoj mensogemaj kaj profitemaj, ĉu en verkoj faritaj de personoj, kiuj restis nur kelkajn tagojn aŭ semajnojn en Konstantinoplo, kiuj nur hazarde renkontis Turkojn en Pera aŭ Galata, sed kiuj neniam ilin observis.

Nu, turkaj kutimoj kaj konceptoj estas tiel malsamaj de la niaj, kelkafoje mem tiel kontraŭaj al la niaj, ke, por ilin koni, estas necese vivi sufiĉe da tempo en kamparaj kaj urbaj medioj, eŭropaj kaj aziaj, kaj ilin penetri, tutesplori.

Kaj tempo ne sufiĉas; estas necese havi tutan spiritan sendependecon, filozofan, rasan kaj nacian observokapablon, kaj antaŭ ĉio, por vere senti la animon de tiu popolo vibri, kaj sub kovro de ĉiutaga vivo trafi la nudan rasan genion, estas necesege paroli ĝian lingvon, ĝin legi kaj skribi.

Nur parolante ĉu kun kamparano ĉu kun komercisto en bazaro, nur legante multe, oni povas akiri pri Turko verajn kaj justajn konojn. Ĉar mi tiamaniere agis, ju pli tiuj venkitoj estas maljuste malhonorigitaj kaj malfeliĉaj, des pli mi ilin amas, ne nur pro ilia malfeliĉo sed ankaŭ pro iliaj nekonataj meritoj.

„L'Humanité” kaj kelkaj socialistaj gazetoj defendas la venkitajn Turkojn; tio ĝojigas min. Socialistoj efektive ne prijuĝas valoron de popolo laŭ milita sukceso, kaj kiel la maljuna Kato, ili ofte estas kun venkitoj kontraŭ venkintoj — „Victrix causa Diis placuit, sed victa Catoni”.

Socialista Partio obeas sian naturan impulson defendi la subpremitan. Kaj la Turko instinkte komprenas socialismon kaj ĝin praktikas.

Post mia reveno el Turkujo, mi pensis verki libron kun tiu titolo: „La Turkoj, profesoroj de socialismo”. Tion mi ne povis fari, sed tiu fakto montras kiel mi ŝatis la sociajn turkajn ecojn.

La Turko, kiu tiel ofte estas priskribita kiel je sango soifanta monstro, estas la plej milda, amema, tolerema kaj frata inter ĉiuj homoj, kaj la plej sincera, honesta kaj justa. Li ankoraŭ posedas la animon de siaj prapatroj, la paŝtistoj de aziaj altebenajoj, mildaj revemuloj, kaj noktaj stelojn gardantoj. Lia sango entenas ankoraŭ lakton de l' homa amemo, kiun trinkis liaj antaŭuloj sur la montoj, pace siajn brutarojn paŝtante.

Ho! tiun puran kaj freŝan atmosferon vi certe ne spiros en koridoroj de Konstantinoplaj palacoj, en oficejoj de ministrejoj kaj administrejoj. Ĉie, je kontakto de l' Eŭropano, la Turko perdis iom de sia origina raso; mi eble mirigos multajn Turkojn; ili neos posedi tiel idilan animon; sed mi ĝin trovis ĉe la veraj Turkoj, la kamparanoj de Malgrandazio.

Tiuj altaj sociaj virtoj estas tute karakterizaj; neniam alia popolo praktikis tielmaniere toleremon kaj fratecon.

Kiel ofte mi aŭdis Turkojn parolante pri ni, Francoj „Cheitan de Français (mi uzas ilian preferatan esprimon, kiu signifas: Francoj de l' Diabolo), ĉie sur viaj monumentoj kaj moneroj vi surskribas „Fratecon!” kaj vi ĝin ne praktikas; vi mem ne komprenas ĝin, ĉar vi estas lupoj unuj por aliaj. Ni ne bezonas tion skribi ie, ĉar fratecon ni portas en niaj koroj kaj ĝin praktikas, amante ĉiujn homojn kaj helpante reciproke kiel veraj fratoj”.

Kaj estas tute juste! Kiam, en iu ajn vilaĝo azia, vilaĝano ĉu malsana, ĉu vundita, ne povas labori, li ne angoras pri grenoj kaj brutaroj. Li bone scias, ke lia brutaro iros sur la kamparon kun la aliaj, kaj ke antaŭ la aliaj, oni engarbigas sian rikolton. Antaŭ ol pensi al si mem, liaj samlandanoj pensos al li, malsana kaj senforta, kaj tute nature, ne bezonante helpsocieton, ĉar ili ne pensas, ke povas okazi aliamaniere.

Kaj tiu popolo estas la plej tolerema el ĉiuj; oni ĝin konsideras kiel fanatikan, kaj ĝi praktikas egalecon kaj fratecon, kiuj estas samtempe enskribitaj en koro kaj lego:

„Ne plu estos malegaleco sur tero” diris Mohameto.
 „Ne plu estos ega malsameco bazita sur antikveco de prapatroj”.

„Ĉiuj homoj devenas de sama patro kaj komuna celo estas frata socio”.

Per libervola kaj konscia intenco kaj por montri, ke ĉiu homo havas nur propran valoron, patra nomo ne estas transdonata kaj ne ekzistas familia nomo.

Tiuj tute demokrataj sentoj montras, ke la Turko estas vera socialisto; li posedas plie tiun apartecon: ne ekzistas ĉe li avidega persona sento de proprajo. Laŭbezone li ĝuas la apudajn objektojn, ne pensante akiri ilin por si mem, kaj li estas ĉiam preta ilin partigi kun iu el siaj fratoj.

Mi ankoraŭ povus multe diri pri la larĝa turka gastameco, pri mil diversaj formoj uzitaj por esprimi profundan senton da justeco kaj frateco.

Post la Italoj, vundas la balkanaj popoloj la malfeliĉajn Turkojn, antaŭ Eŭropo, kiu tamen garantiis turkan landon netuŝeblecon. Sed, kiel povus Anglujo, Francujo kaj Italujo ion malebligi, post anekso de Transvalujo, de Madagaskar, Marokujo kaj Tripolujo?

Dum pacotraktadoj faris Turkujo la plej grandajn oferojn: ĝi konsentis perdi la $\frac{3}{4}$ de sia eŭropa teritorio; sed la Balkanoj postulas Adrianoplon, kiun ili ne ankoraŭ al militis, kaj Eŭropo ilin apogas!

Malfeliĉaj Turkoj! vi nur povas, kiel diris via profeto: „batali ĝis la fino kaj stare morti”.

Malfeliĉa Turkujo! kalumnio cin hontigas kaj subpremas pli ankoraŭ ol malvenkoj: tamen tiuj, kiuj, cin konas, cin estimas kaj salutas!!

Parizo, 20-2-1913.

G. SEJOURNÉ.

Voĉo el la batalkampoj.

La diablo ne estas tiom nigra,
 kiom oni pensas.

Nur malfrue mi legis en I.S.R. no. 12 1912, la ĉefartikolon „La milito”.

La respondo de franca k-do al serba socialisto mi aprobas — mi plene konsentas kun k-do J. C.

Tamen, pri la dua parto de la sama artikolo mi volas

diri kelkajn vortojn. Laŭ mi, socialista gazeto devas konstrui siajn dirojn sur bone ekzamenitaj faktoj — nur tiam la celo atingiĝas. Al mi nun estas nepre neeble skribi detale sur la demando de la Balkanmilito, en kiu mi partoprenas, kvankam ne en la unuaj vicoj (mi estas subĥirurgo en milita kampa malsanulejo).

Per ĉi tiuj linioj mi volas refuti la terurajn kalumniojn, kiuj oni jetis al ĉiuj bulgaroj, per la dirita artikolo. Mi trapasis la vastajn Trakiajn kampojn de Adrianoplo ĝis Ĉatalĝakaj nenie mi vidis aŭ aŭdis pri . . . „nedireblajn hontigojn eĉ je kadavroj de virinoj kaj infanoj” . . . kiel skribas la estimata k-do.

Rimarkinde estas, ke la aŭtoro nenion diras pri la kruelaĵoj faritaj de l' turkaj soldatoj al nemilitanta loĝantaro, precipe kristanoj, multaj gemaljunuloj, pastroj, virinoj kaj infanoj estis kaj estas buĉataj de l' turkaj soldatoj. Ĉirkaŭ vilaĝego Saraj estas buĉitaj de l' turkoj multaj virinoj kaj infanoj. Sur la brustoj (nudigitaj) de l' mortigitaj patrinoj, oni trovis mortigitajn infanojn!

Mi mem vidis fopelitajn virinojn kaj infanojn, kiuj forlasis la hejmojn kaj venis en Ĉorlu kaj alie, por savi sian vivon!

Io plie. Eĉ mi supozas, ke ie sur la vasta batalkampoj, kiuj friponoj el niaj soldatoj agis kruele. Tamen, al unu kruelaĵo farita de Bulgaroj respondas miloj kaj miloj krueligoj faritaj de l' Turkoj al kristana loĝantaro. Jen la vero. La kaŭzo? La milito mem estas terurega barbarajo!

Ni ne pretendas altan kulturecon. Tamen, ni ne estis pli „sangavidaj”, „barbaroj”, „monstroj”, furiozaj lupoj kaj tigroj, ol kiu ajn alia militanto. La samajn „ecojn” elmontrus ĉiu el la kulturaj popoloj, Germanoj, Francoj, Angloj, Italoj, Holandanoj k.c. dum milito.

La plej grava kulpanto por la hodiaŭa Balkanmilito estas: „civilizita”, „kultura”, „kristana” Eŭropo, kiu por siaj je profito avidaj kapitalistoj jetis nin, malgrandaj balkanpopoloj, en militon. Eŭropo povus malebligi militon, se ĝi efektive dezirus „pacon”. Al ĝi ne mankis rimedojn instigi Turkujon enkonduki reformojn en Makedonujo k. a. Tamen, ĝi ne faris ĉi tion kaj tiamaniere kuraĝigis niajn patriotojn, kiuj sub la preteksto: liberigado de sklavigita frato — nin jetis en la faŭkon de la nesatigebla monstro milito. Plej terurega abomenaĵo sub la suno!

Vane niaj fi-patriotoj blekas por la nacia unuiĝo. La nuna

milito ne donos ĝin. Nur sub la reĝimo de l' Balkana konfederacio oni vere atingos vere nacian unuigon.

Do, ni socialistoj, fortege proklamu: Milito al milito! Antaŭ la milito nia partio estis kontraŭ ĝi (milito), post ĝi ni per faktoj ne diskuteblaj batalos kontraŭ ĝi!

La voĉo de bulgaraj socialistoj estis treege malforta kaj ni ne sukcesis malebligi militon. Almenaŭ vi, karaj okcidentaj kamaradoj, per viaj potencaj organizaĵoj, ne permesu al viaj registaroj ludi kun via sorto — akre kaj tondre kontraŭstaru la instigojn al milito.

Hodiaŭ en Bulgarujo funebras ĉirkaŭ 50000 familioj! Pli ol 300000 homaj ekzistadoj estas en mizerego, sekve de l' milito!

Efektive ni venkis, tamen ankoraŭ unu similan venkon kaj ni pereos

For la milito! Vivu la paco! Vivu la internacia frateco!
P. P.

Nun Slavoj mem komencas kalumnii.

Okaze de letero de Peterburgaj studentoj (en januara no.) kaj de artikolo „Protesto” (en marta no.) mi havas kelkajn rimarkojn.

Ne citante multe la leteron de peterburgaj studentoj, mi nur memorigos el ĝi jenajn vortojn: „Ni peterburgaj esperantistoj, bone konante nian slavan mondon, deklaras kaj certigas per nia honesta vorto, ke presitaj en I. S. R. informoj pri „sangavidaj krimoj de Serboj kaj Bulgaroj” estas malnobla kalumnio kaj mensogo”.

Kaj jen, por ke ni pli bone konu „nian slavan mondon” kaj pli solene povu „deklari kaj certigi”, ni, rusoj, nun legas en rusaj gazetoj rakonton de rusa aviadisto Agafanov pri balkanmilito. Agafanov tuj revenis Rusujon el Balkanujo, kie li laboris kiel aviadisto, invitita de serba registaro. Kaj li rakontas:

„Kune kun orda armeo militas taĉmentoj, organizitaj el vilaĝanoj. „Bati Turkon” por ili ŝajnas afero agrabla al Dio. Presitaj en eksterlanda kaj rusa gazetaro informoj pri ekcesoj, faritaj de balkanaj kunuloj kontraŭ paca musulmana loĝantaro de Makedonujo, estas ŝuldaj precipe al tiuj ĉi bandoj.

La orda armeo ankaŭ ne konis indulgon al venkitoj. Amasaj palmortigoj inter Albanoj militkaptitaj estis ordinaraĵ. Por ili (militkaptitoj) laŭ

esprimo de Serboj, oni estis avaraj je kugloj kaj penadis mortigi ilin per tranĉiloj kaj hakiloj. Unu serba oficiro fanfaronis, ke propramane li mortigis 100 homojn” (el rusaj gazetoj ekz. „Denj”, „Utrojuga” kaj aliaj).

Ĉi tiuj konkludoj, ŝajnas, estas superfluaĵoj kaj se antaŭe „kalumniis” „kontraŭslavaj gazetoj”, nun komencis „kalumnii” mem Slavoj kaj slavaj gazetoj.

RUSO.

SOCIA MOVADO.

El Japanujo.

Dum lasta duoncentjaro Japanlando faris gigantajn progresojn en la disvolviĝo de kapitalista sistemo. En la lando disvolviĝis tiel industrio, ke ĝi nun ne nur kontentigas la bezonojn de l' interna vendejo, sed pli kaj pli eksportas siajn produktaĵojn eksteren. Kaj por akiri eksterajn vendejojn, Japanlando dufoje triumfe militis (kun Hinlando kaj kun Ruslando).

Sed kune kun kapitalista sistemo ankaŭ alvenis militarismo, kaj de la malriĉa Japana popolo postulis grandajn oferojn: persona deviga militservo, impostoj, kiuj konstante pligrandigis, ĉar japana registaro pligrandigas sian armeon kaj ŝiparon, reformas armilaron kaj por tio ĉi postulas grandajn rimedojn. Do la tre malriĉa popolo jam estas tro ŝarĝita per impostoj.

Sed, la kapitalismo, krom militarismo, havas ankoraŭ unu akompananton neeviteblan — socialismo. Kaj tiu lasta ankaŭ komencas penetri en la konscion de japana socio kaj en unua vico ĝi prenas la formon de kontraŭmilitarista movado. Pli intensive tiu ĉi movado komenciĝis post rus-japana milito, kiu ne kontentigis la atendojn de japana socio kaj nur pligrandigis impostojn. Sed dum la populara regado de Mutsu-Hito, la japana popolo toleris pro estimo al sia Mikado. Sed jen en pasinta jaro, la maljuna Mikado mortis kaj la situacio tute ŝanĝiĝis. La opozicio komencis plifortigi sian aktivan agadon. Tuj post la morto de Mutsu-Hito okazis ministra krizo. La kabineto de Saionji postulis de parlamento rimedojn por formado de du novajn diviziojn en Koreolando. La parlamento rifuzis. La kabineto eksciĝis kaj nova kabineto estis formita de princo Katsura, kiu denove prezentis la leĝon pri la du divizioj. Komenciĝis luktado inter kabineto kaj parlamento. Por uzurpi la opozicion, princo Katsura permesis

al si kelkajn nelegajojn: li enmiksitis la Mikadon en la luktado kaj dufoje ĉesigis kunsidojn de parlamento por kelkaj tagoj por havi tempon formi el parlamentaj deputitoj sian partion. Sed en la lando komenciĝis protestoj kontraŭ la agadoj de Katsura: en Tokio kaj aliaj grandaj urboj estis strataj tumultoj — popolamaso detruis kelke da redaktoj de gazetoj, kiuj subtenis Katsuran, kaj eĉ okazis mortigoj. Katsura devis ekŝiĝi. Sekvis kabineto de Jamamosa, kun pli ekonomia, pli ŝparema programo.

Krom tiu ĉi antimilitarista movado, en Japanlando komencas ankaŭ laborista movado. Post Kotoku, kiu estis asasinata, la socialismo fariĝis inter laboristoj pli populara kaj po mal multe enpenetras en la konscion de la laboristaro. Oni komencas organizi kasojn por reciproka helpado dum malsano k.t.p. La japana registaro, kompreneble, jam turnis sian atenton je tiu ĉi nedezirinda por ĝi movado kaj kruele persekutas la gvidantojn de l' movado.

Nun oni povas, ĝenerale, diri, ke Japanujo estas je sama vojo, kiel la eŭropaj industriaj landoj kaj la leĝoj de l' ekonomia socia disvolviĝo estas samaj por ĉiuj popoloj sen diferenco de rasoj.

Sed mi devas diri, ke la nuna luktado inter japana parlamento kaj registaro ne signifas luktadon inter laborista kaj kapitalista klasoj.

La alta registaro de Japanlando konsistas el kabineto de ministroj (responda antaŭ parlamento) kaj alta konsilejo, tiel nomita „Henro“ (ne responda). Ambaŭ konsistas el reprezentantoj de aristokrataj familioj-klanoj. Kaj tiu ĉi „Henro“ fakte regas Japanujon.

Tial do nuna luktado estas luktado inter industria burĝaro (el kiuj precipe konsistas parlamento) kaj japana aristokrataro.

Lastaj sciigoj el Japanlando komunikas, ke la budĝeto estas akceptita nur per plejmulto da kvin voĉoj. Samtempe, de ĉiuj urboj de Japanlando oni sciigis pri mitingoj de konstitucionalistoj, kiuj per rezolucioj postulas forigon de regado de la lando de klanoj kaj transdonon de l' potenco al parlamento, t. e. al burĝaro.

KOMPOSTISTO.

El Meksiko.

La vero pri la lastaj armomovadoj, kiuj remetis en povon la dinastion Diaz.

Ideala Registaro por la Kapitalistoj. -- En Eŭropo ĉiam, kiam oni parolis pri Meksiko, la nomo de

ĝia „saĝa Prezidanto“ estis neevitebla kunligata, kaj Porfirio Diaz estis konsiderata kiel la patriarka reganto de popolo, kiun li faris feliĉa.

Ne aliamaniere oni povis interpreti la senĉesan reelektadon de tiu admirinda Prezidanto, dum pli ol kvarcentjaron, kaj ne sole de li, sed de ĉiuj la subaj registoj.

La reĝoj, imperiestroj, prezidantoj, caroj, k.t.p., de la tuta mondo, sendis al la glorplena meksikana ŝtatestro sennombrajn ordenojn el ĉiuj mezuroj kaj koloroj.

La ĵurnaloj plej seriozaj laŭdatis, kiel imitindan registaron, tiun de Porfirio Diaz, dum kiu oni neniam aŭdis pri bruado en la ĉambroj de deputatoj, strikoj, agitado dum l' elekto tempo, nek pri la sennombraj malagrablaj aferoj tre komunaj en la nuna epoko. En Meksiko, la popolo ĉiam reelektis siajn registojn unu voĉe

Jen la kialo: Porfirio Diaz, preninte per mano armita la povon al Prezidanto Lerdo de Tejada (1879), promesis en sia politika programo la nereelektadon, sed baldaŭ forgesis sian promeson, kaj anstataŭ ĝi, li mortigis presliberon, malpermesis l' uzadon de la rajtoj por elektado, parolado kaj asociigo, evitante tiamaniere la disvastigon de liberaj kaj progresemaj ideoj.

Aliaflanke, Diaz metis sin en la manojn de la nord-amerikaj plutokratoj, kaj de la katolika eklezio, kiu volonte helpis la karan Prezidanton mallumigi la cerbon de niaj malfeliĉaj enlanduloj, por pli bone ekspluatadi ilin.

La terurismo uzita de Diaz dum siaj unuaj jaroj da regado kaj lia penado kontentigi la danĝerajn malamikojn, kaŭzis, ke la meksika popolo sklavigis, tute senproteste.

Kompreneble, ju pli la jaroj forpasis, des pli la kapitalistaro kreskis kaj profitis el l'uzado de homaj maŝinoj, kiuj estis devigitaj akcepti tion, kion la kunligitaj tiranoj postulis.

De la gubernestroj ĝis la deputatoj, kaj de la urbestroj ĝis la plej humilaj aŭtoritatohavanto, estis elektataj aŭ reelektitaj de Diaz, per elekto komedion por kontentigi la diplomatistaron

Oni povus skribi multajn librojn, rakontante la neimageblajn krimojn de kapitalistaro dum la preskaŭ biblia epoko de la saĝa regado de Porfirio Diaz.

Tiu ĉi tirano, anstataŭ edukadi la popolon iom post iom kaj redoni la rabitajn rajtojn, imagis sin nemortebla kaj lia deziro estis: esti ĉiopova reĝo.

Eĉ la elotoj de antikva Sparto ribelis kontraŭ siaj subpremantoj, kaj la meksikanoj, fine, faris same.

La Revolucio 1910-'11. — Estas jam tre bone konata psikologia fenomeno de subpremado: la subprematoj perdas virecon kaj estas nekapablaj riski ion por liberiĝi, ĝis ia „frenezulo” havas la kuraĝon manpreni la standardon de libereco. Tiam la movado estas facila.

La putra registaro de Porfirio Diaz iĝis tute nesuferebla; ĉiuj, kiuj ne estis burĝoj, plendis kontraŭ ĝi; tiuj, kiuj iamaniere intencis vekti la popolon, estis malliberigataj, mortigataj aŭ ekzilitaj; la leĝaj vojoj ne estis permesataj, aŭ se permesataj, estis *danĝeraj* por la koncernaj personoj, kaj inter niaj dekkvin milionoj da loĝantoj ne estis aperinta la „frenezulo”, ĝis Francisco Madero stariĝis antaŭ Porfirio Diaz, kiel konkuranto en la prezidanta elektado, en 1910. Kompreneble, la karnavalajo de Diaz sukcesis kaj Madero estis malliberigata kune kun multaj el siaj anoj.

Per kelkaj ruzajtoj, Madero povis akiri sian provizoran liberigon kaj forkuris al Usono, kie li organizis la revolucion kontraŭ Diaz.

La movado, kiel mi jam diris, estis facila; la popolo, speciale la kamparlaboristoj, helpis kiel eble plej bone; la nomata publika opinio — sinjorino ŝanĝema kaj frivola — ekmallaŭdis la falintan tiranon; la kapitalistaro ankaŭ iĝis ano de Madero, kaj je la 7a de Junio 1911 li eniris Meksikurbon, meze de la entuziasma popolo, kiu aklamis lin kiel sia savanto.

Porfirio Diaz foriris al Eŭropo.

Ni, kiuj partoprenis la movadon sen havi ideon akiri por ni mem publikajn oficojn aŭ rekompencojn, reiris al nia kutima laboro; sed, malfeliĉe, ne ĉiuj faris ĝin: kelkaj postulis por si mem eĉ sensencaĵojn, kaj, ne sukcesante je la plenumo de siaj ambicioj, ili denove prenis la pafilon por daŭrigi tiun aventurplenan vivadon.

Poste, kiam la kapitalistoj konvinkigis, ke la nova registaro estis pli je la flanko de laboristoj ol de la nenionfarantoj, hipokrite komencis konspiradon kaj baldaŭ la idiota publika opinio ŝanĝigis kontraŭ Madero.

Ĉiu Meksikano estis preta kritiki kaj malhelpi la registaron, sed neniu penadis helpi kaj kunlaboradi.

Estas natura afero, ke la privilegiataj klasoj, la katolika eklezio, la nordamerikanaj plutokratoj k.t.p. estis kontraŭ Madero, sed monstraĵo estas, ke individuoj, kiuj diras sin progresemaĵoj, amantoj de libereco, apostoloj de noblaj idealoj, ankaŭ uzadis sian talenton por trompi l' opinion de niaj

kamaradoj en Eŭropo kaj Usono, per artikoloj en kiuj oni laudadis la kontraŭrevolucion, dirante, ke ĝi estis socia movado, dum efektive ĝi estis nur simpla intrigo de la riĉuloj kaj de malsanaj pasioj de kelkaj eksrevoluciistoj de 1910-'11, ne kontentigitaj. La plej kleraj figuroj el la Diaz-regimo helpis volonte la faligon de registaro, kiu permesis, ke la sklavoj elektis eĉ socialistojn kiel gubernestrojn kaj kiuj fondis „Laboran Oficejon” por solvi disputojn inter ekspluatantoj kaj ekspluatatoj, kaj kiu ĉiam klinigis al la lastaj.

Tiu tute neadmirinda laboro de tiuj malveraj kamaradoj donis la plej maldolĉajn fruktojn.

La nevo de Diaz kaptas la povon. — Eble oni supozas, ke la supre-skribita estas ankaŭ produkto de blinda pasio kaj ke la registaro de Madero estis ankaŭ aŭtokrata, kiel tiu forpelita, sed jen kelkaj faktoj nenigeblaj, el kiuj niaj legantoj povas eltiri deduktojn.

Generalo Felix Diaz, nevo de l' tirano Diaz, kaj kiu dum la regado de sia kara onklo sufiĉe prosperadis, provis antaŭ nelonge enscenigi militistan movadon por faligi Madero'n. Ne ĉiuj altranguloj tamen sekvis Felix Diaz, ĉi tiu estis kaptata kaj, anstataŭ mortpafi lin, oni simple lin malliberigis.

Je la 8a de Febr. denove estis ribelo, helpata de militestroj, kiuj liberigis Diaz kaj faris atencon kapti la Nacian Palacon, kio ne sukcesis. Feliĉe por la lando, dum la batalo falis pro pafo Generalo Bernardo Reyes — ankaŭ re-liberigita — la plej fervora subpremigo en la mano de Porfirio Diaz. Tiam Felix Diaz sukcesis preni militprovizejon, meze en la urbo Meksiko; kaj post dek tagoj de pafilado kaj kanonado, la ĉefmilitestro de Madera, Generalo Huerta, nun provizora prezidanto, finis l'aferon per „coup d'Etat” aranĝita inter li kaj Felix Diaz.

Madero estis malliberigata, same kiel la vicprezidanto, kaj tuj Madero iris al la nordamerika ambasadorejo kaj tie la tri, Huerta, Diaz kaj l' ambasadoro, diskutadis la estontecon de nia lando

Felix Diaz diris, ke li estas neambiciulo kaj ke li ne akceptus la provizoran prezidantecon, sed ke li atendos ĝis la nova elektado estos parolinta.

La burĝa kaj katolika presaro flategas la gloran generalon Felix Diaz. La usona registaro estas tre kontenta pri la solvo de l' afero. La bankistoj, kiuj rifuzis monon al Madero

por daŭrigi la kontraŭstaron al la kontraŭevolucio, nun estas pretaj prunti kiom ajn da mono al la „nova kaj energia” registaro, naskita el la glora nevo de la glora onklo.

Milita regado atendas nin.

Pascual Orozco, unu el la plej konataj revoluciistoj de 1910-'11, kaj kiu poste perfidis Maderon, jam akceptis la registaron de Diaz, kaj same kiel li, multaj aliaj.

La socia flanko de tiu ĉi mirinda movado estas tute ne trovebla. Estus miraklo — kaj mirakloj ne ekzistas — se la subpremantoj de la homaro de kiam la mondo estas mondo, estus nun la reformistoj revitaj

Meksiko estas, fakte, regata de Henry Lane Wilson, nord-amerikana ambasadoro; Gen. Huerta, reprezentanto de militarismo; Gen. Felix Diaz, reprezentanto de la reĝimo de sia kara onklo; Léon de la Barra, kondukisto de la katolika eklezio; kaj la burĝaro, kiu havas multajn reprezentantojn.

Se tiu ĉi kontraŭevolucio estas sankta kaj bona, laŭ la opinio de la meksikanoj de Kalifornio, kiuj disvastigis tiun ĉi famon, tiukaze aŭ mi estas perdinta miajn kvin sentojn aŭ socialismo estas dogmo, kiel tiuj el la religioj.

La dinastio Diaz denove penados feliĉigi nin.

Ho Libereco, kiel multekosta ci estas!

Novaj martiroj de libereco.

Abomena mortigo de du politikaj malliberuloj en Meksikurbo. — Se ankoraŭ restis dubo pri la celoj kaj metodoj de la nuna kanibala registaro, la mortigo de du politikaj malliberuloj, S-roj Madero kaj Pino Suarez — inter aliaj — jam devas esti malfermita l' okulojn de la veraj batalantoj pro libereco sur la tuta mondo.

Tiu ĉi duobla mortigo estis tute aprokata de la kapitalistaro kaj eĉ de la nordamerikana ambasadoro, ĉar neniu povas kredi kun rezono kaj logiko, ke individuoj, kiuj serĉas la „valoran apogon” de la Usona registaro, kiel la dinastio Diaz faras, povus agadi kontraŭ la deziro de la protektontoj. La senhonta gazetaro, kiu atakadis Madero, kaj tute maljuste, same kiel la deputataro, nun estas mutaj kaj laŭdas tion, kion ili kontraŭstaris dum la pasinta reĝimo.

Eble estas en eksterlando personoj, kiuj povus imagi, ke la mortigo de tiaj demokratoj estis, certe akcidenta, sed mi penados klarigi, kion oni nomas tie ĉi „Ley Fuga” — leĝo de forkuro — rimedo multplikata de la glora Porfirio Diaz por malaperigi siajn politikajn malamikojn, kaj

kiun „leĝon”, lia kara nevo komencis uzadi tre sukcese.

Pro kia ajn kulpigo oni malliberigas iun, kie li loĝas; oni faras leĝajn komediojn el kiuj rezultas ordono de juĝisto de alia loko, kiu postulas havi ĉe li la malliberulon por ekzameni lin k.t.p. Je la meznokto alvenas eskorto konsistante el „rurales” (kamparaj policianoj), kiu prenas la viktimon por „alkonduki lin”, kaj dum la vojo, je konvena loko, oni mortpafas lin dorsete!

Poste, la ĉefo de la eskorto faras raporton en kiu li diras, ke la malliberulo intencis forkuri kaj ke ili estis devigitaj pafi sur li. Aliafojoj oni diras, ke grupo da amikoj de la mortinto intencis savi lin kaj dum la pafado, akcidente kuglo lin trafis.

En la Madero'a afero estas faktoj, kiuj pruvas tutklare la krimon; mi prenas ilin el la klerikalaj kaj kapitalistaj gazetoj — ne estas aliaj nune. Jen la faktoj:

Madero kaj Pino Suarez, de kiam la frato de l' unua estis mortpafita, estis akompanataj tage kaj nokte de Japana konsulo kaj aliaj diplomatistoj por protekti ilin.

Antaŭ tiu ĉi baro, la Generalo Huerta ordonis, ke oni izoligu ilin; do, diplomatistoj ne plu povis ĉeesti tie.

Poste, oni faris komedion por submeti Madero kaj Pino Suarez al la Federala Juĝisto; kaj, konsekvence, la malliberuloj de la Nacia Palaco devis esti translokataj al la Pundomo.

Kaj fine, laŭ oficialaj raportoj: je la 11.30 horo nokte, de la 22an de Februaro, la „rurala” ĉefo Cardenas kun aliaj tri homoj, prenis la viktimojn el la Nacia Palaco, sur du aŭtomobiloj kaj ĉe loko ekster la urbo, sur la vojo, grupo da amikoj de Madero prenis savi lin, kaj dum la pafado oni mortigis ambaŭ politikajn malliberulojn!”

La oficiala aŭtopσιο-raporto diras:

„L' ano Francisco Madero mortis pro du kuglo-vundoj en la kranio, la nokton de la 22an k.t.p.”

„L' ano advokato Jose Maria Pino Suarez mortis pro tri kuglo-vundoj en la kranio, k.t.p. k.t.p.”

Kompreneble, por daŭrigi la karnavalajon, oni malliberigis la „mortigilojn”, kaj eĉ oni juĝos ilin kaj ili estos kondamnataj je severaj punoj pro sia senzorgemeco, sed fine oni pardonos ilin.

Tiu ĉi estas la reĝimo, kiun la Panurgaj ŝafaroj nun aplaŭdas kune kun la Sankta Eklezio kaj la burĝaro. Oni

aŭdas ĉie: „Ho! estis iom forta, tia afero — la mortigoj — sed necesa por havi la karan pacon por revivigi la „business“ (monogajnado).

La „revoluciistoj“, kiuj rifuzis helpi Madero en sia nobla afero kaj postulis de li eĉ neeblaĵojn, nun tre humile kaj ĝoje submetiĝas sen kondiĉe al la kara nevo de Porfirio Diaz.

Nur tre malmultaj Meksikanoj, kiel k-do Fuentes, elektita gubernestro de la malgranda ŝtato Aguascalientes, havis la civilan kuraĝon ne akcepti la putran revivigitan reĝimon de la dinastio Diaz, sed jam la militarismo iris polvigi lin.

La nomata publika opinio kondamnas ĉiujn, kiuj ne akceptas la nunajn kanibalojn.

Teruro regnas ĉie.

Adiaŭ, kara Libereco, ci ne povas restadi ĉe ni. Meksiko sopiras sub la sabro de Tiranoj

GENARO E. TERRUÉS.

El Rusujo.

Letero de ekzilito en Siberujo. Kamaradoj laboristoj! Vi ĉiuj legis pri la Algaĉa kaj Kutimara katorgoj (vidu I. S. R. 1a p. 10); nu, mi deziras rakonti pri vivado de la politikaj malliberuloj en Orla katorgo (Rusujo).

Mi komencos kun la akcepto.

Multa batado komenciĝas tuj post alveno en la mallibereja korto. Komenciĝas demandado: de kie? kiel nomiĝas? pri kio juĝita? Sed se oni ne respondas soldate, sufiĉe precize kaj kun respektplena „Via Moŝto“, tiam oni devige konatiĝas kun la pugno de „lia moŝto“, kiu eĉ ne sin ĝenas uzi la sabron. La nove-veninta malfeliĉulo devas suferi duoblan inkvizicion. Li tuj estas kondukata al ŝvitbanejo. Ĉirkaŭata de soldatoj li devas senvestigi sin, demeti sin de ĉio, dum batado kaj insultoj. Poste, en alia ĉambro, li ricevas por vestaĵoj malnovajn ĉifonojn, per kiuj li devas eble plej rapide sin vesti. Por ĉiuj nelertaj movoj oni vin atakaĉas kaj batas. Poste sekvas ankoraŭ demando: de kie, kiel nomiĝas? Kaj ankoraŭ ĉiu, al kies kapo venas tio, provas sian manon. Tio ĉi estas bildo de l' alveno.

Poste, oni lokigas la alveninton en sola ĉambreto, kie ĉiutage li estas turmentata pro ĉio, por kio mallibereja administracio bontrovas. Oni batas por tio, ke fenestro estas fermita; kaj morgaŭ oni batas por tio, ke fenestro estas malfermita; batas por tio, ke ĉapelo kuŝas tiamaniere sed ne alimaniere

kaj batas por tio, ke viŝtuko pendas tiamaniere, ne alimaniere. Oni batas por tio, ke taso estas malpura, kaj tial oni ordonas enskribi(tranĉi) sian nomon, por ke oni povu scii, kiu estas kulpa; alifoje oni batas por tio, ke sur taso estas skribitaj nomoj. Por ke povu esti batata, oni aranĝas tra-serĉojn. Oni batas por poŝoj kaj ankaŭ por naztukoj, ĉar ĉi tiuj en Orla malliberejo estas malpermesitaj objektoj, kvankam naztukojn oni povas aĉeti en la kontoro. Pleje oni batas per pugnoj kaj ŝlosiloj de pordoj. Okazas ankaŭ kapotordo k.t.p. k.t.p. Matene ĉio okazas tre rapide; oni devas kuregi kun plena nokta vazo (farita el porcelano) kaj se kontraŭkuras kamarado kun malplena vazo, tiam ofte okazas katastrofo, vazoj disrompiĝas, kaj la enhavo de l' plena vazo elfluas sur la kapoj de l' kamaradoj kurante malsupre. Post tio kompreneble sekvas kruelega batado. Generale, eviti batadon ne estas eble. Korpa puno okazas ĉiusemajne. En Decembro 1911 unu politika malliberulo pro korpo-puno mortis. Okazo estis tia — nove venintan kamaradon oni lokigis en sola ĉambro kaj komencis bati; li protestis kontraŭ la batado, kaj provas, ke tio estas kontraŭ leĝo; tial malliberejestro ordonis lin korpopuni kun 30 batoj per vergo. Pro tio la kamarado indigna insultis la estraron kaj la inspektoron. Por tio la inspektoro ordonis korpopuni kun 50 batoj per vergo. Tiam la kamarado komencis insulti guberniestron kaj tiu ordonis korpopuni kun 100 batoj per vergo, tiel dum tri tagoj, tiu kamarado ricevis 180 batojn kaj pro tio en malsanejo mortis. Leterojn oni povas skribi dufoje en monato po unu letero ĉiufoje. Skribi oni povas nur al la familia nomo, kiun havas skribanto, kaj observisto ordonas: skribu ke vi estas sana, kaj ke oni sendu monon, baldaŭ, baldaŭ.

En Orla katorgo trovas 1000—1200 malliberuloj, inter kiuj 150 politikaj, kiuj estas lokigitaj inter krimuloj; tiamaniere batali kontraŭ administracio ne estas eble.

La kamaradoj en Orla katorgo sin turnas al ĉiulandaj laboristoj en la mondo por defendo. Ili petas helpon.

Mi turnis min ankaŭ al socialdemokrata frakcio de Rusa 4a Regna Dumo.

Mi plenumas mian kamaradan devon, kun kiu min ŝarĝis la kamaradoj en Orla katorgo.

Kun kamarada saluto

J. B.

P.S. Mi petas la aliajn laboristajn gazetojn represi tiun artikolon.

Tradukis por I. S. Revuo A. VI.

Kiam du faras la samon!

La ĉambrego de l' jurjuĝejo estis jam plena antaŭ la tempo fiksita. Oni atendis interesajn: Mortiginto, kruela homo, estis kondamnata. Solena silento regis en la ĉambrego. Seriozaj mienoj, serĉantaj okuloj; kaj inter tio rigardaĉis la festeornamita scivolemo. Fine estis kontentigota la emo al sensacio. La akuzito staris antaŭ siaj teraj juĝistoj. En la aŭskultantejo rektiĝis la kapoj. Ardantaj okuloj estus plej volonte akompanintaj la akuziton ĝis la eŝafodo. Juĝisto antaŭlegis per unutona voĉo la akuzajon. Mallaŭta murmuranta bruondo trablovis la juĝistojn. En la aŭskultantejo estis ega emocio. Tute silente, sen vortoj. Vere, strange okazintajo. Mortigo, al kiu ne ĉeestis atestantoj, nur la mortiginto kaj la mortigito. Kaj la farinto estis akuzinta sin mem al la polico! Oni povis vidi la miregon sur la vizaĝoj de l' aŭdantoj. Krimulo, antaŭe jam kondamnita al multaj eĉ longaj punoj, kaj nun mem akuzinta sin al la juĝisto. Vere, tutnova kazo originala por la krimostatistiko. Indiferente aŭskultis la akuzito al la disvolvo de l' akuzo. Je la demando de l' prezidanto, ĉu li kion ajn volas diris aŭ ion ĝustigi, respondis la konfesema krimulo per firma voĉo: „Nuntempe ankoraŭ ne!”

Kaj nun levis sin la prokuroro per eldiri bone preparitan paroladon de akuzo. Tute negocieme, kiel ĉiam, li metis punkton post punkto, pruvon post pruvo, klare kaj videble antaŭ la okuloj de l' juĝistoj. Por pruvi, ke la krimulo agadis kruele li fortepatose akcentis la vortojn: „Estimataj S-roj! Intence, la jus-akrigitan ponardon en la mano, li metis sin kontraŭ sia plendinda viktimo, malforta viro. Li, la pli forta, boris kruele la tranĉilon en la koron de sia kontraŭulo, vokante la vortojn: „Mortu perfidulaĉo.” Kaj ĉio ĉi pro senordema stratpublikulino.” Ĉi tiuj vortoj faris profundan impreson je la ĉeestantoj. Nur ne al la kruelulo sur la akuzbenko, pro kio lin trafis abomenplenaj rigardoj. Sed, trankvile, sen tremi, la mortiganto tenadis la rigardojn. Juĝistoj, kiel ankaŭ aŭskultantoj, mallaŭte interparolis. Ĉiu ekspiregis, kiam la akuzanto proponis 15 jaran malliberpunon. Videbla kontentiĝo disvastiĝis sur la vizaĝoj de l' ĉeestantoj. Poste, la sinjoro defendisto multe klopodis klarigi la aferon. Li akcentis la honestecon, la memakuzon, pro kio lia kliento meritas punmalaltigon.

Tiam petis la akuzito la parolon. Malrapide li leviĝis kaj

komencis paroli per klara voĉo: „Tre estimataj S-roj! La „Klinkenfrice” (tiel ni nomis la mortigitan Fritz Uffe) trompegis min per virinaĉo. Fritze, mi diris al li, kiam ni iam renkontos nin, okazos sanga kontentiĝo. Kaj, post kelke da tempo, ni staris unu kontraŭ alia, mallumnokte en ia flankstrateto. Fritze, eltiru vian ponardon! Hodiaŭ estas venĝtago... mi aŭ vi! Li estas restinta sur la batalejo... S-roj mi ne petas favoron! Nur kiel estis, tion ĉi mi volas klarigi. Ne embuske mi ponardis Fritze. Ne! okulo en okulo ni kontraŭstaris, ĉiu la tranĉilon en la mano. Kaj nun, s-roj, permesu kelkajn vortojn! Pro mi kaj Fritz, kiu pereis en honesta batalo, pro ni ne ploras maljuna patrineto. Ankaŭ ne fianĉino. Ĉar la „Liese”, la nigra sorĉulinaĉo, certe jam trovis alian. Sed hejme mi konas tre aĝan patrinon, kiu perdis pro morto sian solan 24 jaran filon; ŝi ĉiutage iradis al la stacidomo, por atendadi sian mortintan filon. Sed tiu neniam revenis. Tio estis ankaŭ neebla, ĉar li estis malviva! Studento, kun kiu li duelis — ankaŭ pro virino — mortpafis lin. Kaj tiu, kiu faris tion, jen li sidas, kaj jus nomis min mortiganton! Sinjoro akuzanto, se mi estas... tiam vi ankaŭ estas mortiganto... vi.” Fortaj brakoj prenis la krimulon kaj nebligis lin moviĝi.

La furioza viro treege denove kriegis: „Se mi estas mortiganto, tiam la S-ro prokuroro estas ankaŭ mortiganto... Ni tute kiel mi havas homon sur sia konscienco; li ankaŭ mortigis homon.” Servistoj kaj ĝendarmoj rapidis sendanĝerigi la furiozulon. Ili katenis lin. La juĝistoj postulis por l' altan punon. Kiam la ĝendarmoj estis portintaj la kateniton ĝis la pordo, li ankoraŭfoje turnis la kapon kaj kriegis kvazaŭ sovaĝa besto: „Jes, se estas mi, tiam li ankaŭ estas krimulo, la alte estimata Prokuroro... Kiam du faras la samon, tio do estas la sama... aŭ ne?” De ekstero sonis peza, ĉensonantaj paŝoj... La juĝo estis elparolota pli malfrue.

Tiel oni aŭdis diri la prezidanto. Kun pala vizaĝo kaj ardantaj okuloj la Prokuroro apogis en sia oficoseĝego. Mairapide malpleniĝis la salonego. Estis al ĉiuj kvazaŭ estis okazinta terura eksplodo, por diskonigi malnovan krimegon.

KARL DREYER, Linden H.



Atentu!

Eksterlandaj kaj germanaj kamaradoj, kiuj vizitos kiun ajn el la multaj kongresoj, okazontaj dum 1913 en Breslaŭ, estas petataj skribi tuj al nia prezidanto, kamarado Otto Zimmermann, Breslaŭ, Bergstr. 27, por ke nia grupo sufiĉe frue povas havigi al ili bonajn loĝejojn en nia urbo.

LABORISTA ESPERANTISTA GRUPO,
Breslaŭ I, Margaretenstr. 17.

Laborista Devo.

Unue, estas necese aliĝi al sindikato, kiu estas tuja defendilo por ĉiu gildo. Krei sindikatojn kie ili ne ekzistas; ilin plifortigi kie ili ekzistas; jen la ĉefa devo de la laboristoj ĉiumetiaj, sur la kamparo kiel en urbo.

Dank' al sindikato, oni povas plialtigi salajron, aŭ malebligi ilian malplialtigon, defendi kamaradojn senjuste fordungitajn, respektigi, ĝis ia grado, la liberecon kaj indecon laboristajn.

La sindikato estas la unua lernejo de solidareco por salajruloj kaj ĝi estas necesega batalilo kontraŭ piej tuja danĝero. Se la sindikato estas forta, la mastroj devas atenti pri ĝi kaj oni povas plimalgrandigi ilian ekspluatadon.

Tamen tiu organizajo ne sufiĉas.

Ĉiam, kiam la kapitalista burĝaro posedos ĉiujn produktilojn, ĝi daŭrigos plenumi sian taskon, tie estas, depreni grandan parton el la produktajtoj de la salajrata laborado. Sekve, ne sufiĉas batali sindikate kontraŭ la posedantaro; tio estas neegala batalado en kiu kapitalo ĉiam fine venkas. Oni devas fari ion plian. Necese estas, ke la tuteco de ĉiuj organizitaj laboristoj, el ĉiaj korporacioj, kuniĝu en unu nura partio. Tiu partio estas la partio de la laboristoj, de la salajruloj, de la oficistoj, ĝi estas la partio de l' laboro, kiu devas kontraŭbatali ĉiujn burĝarajn partiojn, kiaj ajn estas iliaj nomoj; al tiu partio vi devas aliĝi, ĉiuj, vi malfeliculoj kaj ŝtelitoj! Vi devas aliĝi al la grupoj por sociaj studoj, kiuj ĉiam pli kaj pli, kaj ĉie, plimultiĝas, en vilaĝoj kiel en urboj, malgrandaj kaj grandaj.

MARCEL CACHIN,
membro de la Pariza Urbestro.

(Eltirita el „*Laborista klaso kaj socialismo*“, tradukaĵo de LEON BERLAND (Urba konsilanto) kaj L. VERGNAUD; havebla kontraŭ respondkupono (0.10 Spd.) sendita al LEON BERLAND, 7 rue de la Paix, Limoges (Franclando).

El „Golos truda“. *)

Estas du specoj de socialismo. Ili ambaŭ celas maksimuman bonstaton de ĉiuj. Unu celas atingi universalan feliĉon, alia ebligi ĉiun fariĝi feliĉa laŭ sia volo. Unu akceptas potencon de l' ŝtato, alia konfesas nenian potencon. Unu postulas monopolon por la ŝtato, alia celas nuligi ĉiujn monopolojn. Unu deziras ke regata klaso fariĝu reganta, alia celas detruon de l' klasoj. Unu konfesas la socialan militon, alia kredas nur aferojn de l' paco.

Estas nur tiuj du specoj de l' socialismo. Unu estas en aĝo de l' infaneco, alia de l' matureco. Unu estas jam pasinto, alia estonto. Unu devas cedi lokon por la alia. Kaj ĉiu el ni devas elekti inter du socialismoj tiuj, aŭ tute ne rigardi sin kiel socialiston.

Esperantigis N. STURNO.

*) Al rusaj kamaradoj (precipe al la Eksekleziano) kaj entute al ĉiuj gekamaradoj, kiuj legas rusan preson, mi insiste rekomendas aboni la ĵurnalon, liberan de politikaj katenoj de Ruslando. Tiu ĵurnalo estas eldonata en rusa laborista grupo en New-Jork („Golos truda“ — Voĉo de Laboro) P. O. Box; 41 Station D, New-Jork, N. J.). Jarabono estas 1 Sm. afrankite.

Por ruslandanoj estas bezonaj specialaj informoj. Bonvolu peti, gekamaradoj. N. S.

POR LA VIRINOJ.

Komerco je knabinoj.

Fine ni kutimas al ĉio. Bedaŭrinde, ĉar tiu estas unu el la k. ŭzoj, kial la laboristklaso ne pli multnombre kontraŭbatalas la maljustecon faritan al si, ke ĝi ne sentas pli akre la putrajn partojn kaj la mizeron de nia socio, kaj *volas* forigi ilin. Eĉ ili, kiuj bataladas por pli bona socio ne ĉiam estas penetritaj, *kiel* granda kaj bela kaj benoriĉa estas la laboro, al kiu ili sin donas. Ĝis kiam la aŭdado de ia afero malbona en eksterlando profunde trafas nin kaj hele lumigas ankaŭ la saman putraĵon en nia ĉirkaŭajo. Tiam ni mezuras momente la tutan mizeron de ĝi.

Antaŭ ne longe ni povis legi artikolojn pri la knabin komerco en Ĥinuĵo. Tiu komerco ŝajne estas organizita tie, same kiel aliaj entreprenoj.

Terure estas legi pri la ekspluatado de tiu malfeliĉaj knabinoj. Ankoraŭ tre maljunaj la estajetoj estas vendataj de siaj malriĉegaj gepatroj al la knabinkomercistoj.

Kelkfoje tia knabino estas aĉetata por 4 spesmiloj kaj poste vendata po 2000 spesmiloj. Kelkaj knabinoj estas vendataj de la komercistoj al riĉaj familioj, kiel servistinoj. Ilija sorto estas la plej bona. Sed la plimulto alvenas en la manojn de posedantino de publika domo aŭ ĉe iu kantistino.

Tiuj knabinoj estas bona spekulado por siaj posedantinoj. Kiam tia kantistino maljuniĝas kaj ŝia beleco malpliĝas, tiam la knabinoj ankoraŭ estas por ŝi vasta fonto de gajno.

Kaj tiel ekzistas en Hinujo, dum centjaroj, konstanta ĉirkaŭirado je la regiono de la prostitucio.

En Sjanghai, urbego kaj centro de la knabinkomercio, nun estas fondita konstruaĵo nomita „Pordego de Espero” en kiu nuntempe 120 falintaj knabinoj trovas azilon.

Sed 120, kio estas tio, kontraŭ la miloj kaj miloj kiuj ĉiujare pereas en tiu ĉi mondurbo.

Ankaŭ ekzistas konstruaĵo por pli malgrandaj knabinoj.

Kiel gaje ludas tie la malgrandulinoj, ni legis en iu gazeto.

Kion ili scias pri la kruela sorto de kiu ili estas desiritaj? Kion ili scias de la doloroj suferotaj de ili? nur por esti gajniloj por siaj fimastrinoj. Abomeninde, ĉu ne? Sed kiel estas ĉe ni?

Ho, se estus sole por fari finon al tiu afero, tiam jam la virinoj devus batali por la socialista socio. En tiu socio nur ne estos eble aĉeti virinkorpon por mono. Nur la socialismo povas finigi la maron de la mizero por la virino. Ĉu la virinoj ne devas stari en la unuaj vicoj? Socialismo portas al ili duoblan liberigon, kiel homo kaj kiel virino.

Venlo (Holando).

J. HUMMEL.

Se mi estus patrino....

Germana gazeto enpresis antaŭ nelonge artikolon el organo itala, sub suprenomita titolo. La artikolo skizas la sentojn kiuj naskiĝas en la animo de patrino kies filo estas envokata je milito. „Se mi estus patrino”, tiel komenciĝas la artikolo. „kaj se mi havus filon, kiu devus foriri militon, tiam mi dirus al li energiajn vortojn de abomeno kontraŭ milito kaj de amo al homoj”, kaj la artikolo konkludas, ke la filo ne devas fariĝi mortiganto, ke li devas rifuzi mortigi.

Li devas partpreni al nur unu milito: al la sankta milito por libereco kaj justeco.

La redaktoro de l' germana gazeto, kiu reprenis tiun artikolon, estis punata per 6 semajnoj malliberejo, ĉar ĝi estis rigardata kiel danĝera propagando kontraŭmilitarista!

Granda loĝeja unio en Milano, Italujo, subvenciata de l' urbo, decidis malpliigi per 10 ĝis 30% la lumonon por multinfanaj familioj.

Esperanta kolonio en Brazilujo.

K-do de „Liberiga Stelo” tradukis por marta n-ro (p. 64) artikolon, en kiu estas plendata pri brazilanaj friponoj k.t.p. Mi, certe, ne riproĉas al li, ke li faris tion, sed tion oni ja povas legi en ĉiuj naciaj gazetoj, tial estus eble pli bone, se la k-do redaktoro estus presinta mian artikolon, kiu al la afero pli utilis ol tiu de l' nomita k-do. Mi rekomendas: studi la vivon en francaj vilaĝoj, ĉu la servistoj forkuras urben aŭ ĉu ili restas volonte ĉe siaj mastroj. Al la germanoj mi memorigas la leĝon de la Gesindeordnung (reguloj por servistoj de terposedantoj); ĝi estas depost cent jaroj la sama: laŭ ĝi la sklavoj havas nenian rajton ol labori kaj loĝi en pestaj ĉambraĉoj k.t.p. k.t.p. Kiam oni volas komparojn, oni ilin povas havi ĉiutage, ĉar ni ja vivas en la plej reakciemaj ŝtatoj en kiuj la plej reakciemaj loĝantoj; la kamparanoj kaj iliaj partianoj havas la remojn en la mano. Ne plu mi volas disputi pri tio. Kiu havas malfermitajn okulojn, tiu mem vidas tion. Bone diras ĉi-sube Fratecano, ke ni ne estos ies dungito, sed liberaj terkulturistoj. Tial mi denove alvokas tiujn, kiuj jam skribis al mi, ke ili sin ne lasu trompi. Por efektiviĝi la intencon, ni nun tuj senprokraste volas elmigri kaj mi petas tiujn, kiuj estas pretaj rapide sendi al mi sian deklaron. Oni kunprenu ankaŭ sinjorinojn aŭ infanojn. Ĝis nun ni estas 6 certaj personoj. Kiu opinias, ke mi estas agento de brazilana registaro, tiu povas postuli miajn du manojn, kiam ĝi veriĝos.

Kun kamarada saluto

Via V. STRASSER.

La skribinto de lasta artikolo „Pri kolonio en Brazilujo” volis laŭ ĉio paroli pri „Esp. kolonio en Brazilujo”, sed li efektive nur parolas pri ŝtelistoj, rabistoj k.t.p. en la urbo S. Paulo, pri dungitaj laboristoj en kafoplantajoj (fazendoj).

kaj tute nenion diras pri la fondota Esp. kolonio aŭ nur pri kolonia vivo ĝenerale.

Li versajne eĉ ne havas imagon pri ĝi aŭ volas nur malhelpi elmigradon de plej kuraĝaj kaj kapablaj k-doĵ. Mi certe ne volas disputi, eĉ ne dubi pri vereco de tiuj informoj, sed kia ridindaĵo! Ĉu tiuj urbaj rabistoj, ŝtelistoj, k.t.p. (kiuj cetere troviĝas en ĉiuj grandurboj, ankaŭ eŭropaj) kaj ĉu tiuj dungitaj laboristoj, sklavoĵ de la rabemaj kafoplantaj-posedantoĵ, ion koncernas nian intencitan kolonion? Tute ne. Ni estos tute liberaj, memstaraj terkulturistoj aŭ entreprenantoĵ industriaj, sed nenion komunan ni havos kun ili, kaj neniam fariĝos ies dungitoĵ. Por pluaj klarigoĵ mi rekomendas al la skribinto, legi mian artikolon en januara n-o.

FRATECANO.

Opinioĵ kaj respondoĵ.

Nia frata organo „Kulturo” rimarkas en sia marta n-ro: I. S. R. regule alportas el Bohemio leterojn de iu pseŭdonimulo „Verama”, kiu sin skribas false „soc.-dem.”, kvankam li videble estas ia konfuza burĝa radikalo. Ni devas publike proklami, ke liaĵ leteroj tute ne reprezentas opinion de ĉeĥaj laboristoj kaj ke ili ofte enhavas malraciajn naivajn kalumniojn el klerikalaj ĵurnaloĵ.

Peto al ĉiuj kunlaborantoĵ de I. S. R. — Certe, ĉiu leganto de nia revuo atendas ĉiam senpacience la novan kajeron, por tuj scii la novaĵojn el la tutmonda laborista movado. En la lasta tempo aperis la gazeto tre neregule, kaj k-do Nutters atribuis tion al la ago de kelkaj k-doĵ, kiuj postulis enpreson de artikoloĵ en sekvantan numeron, kvankam ili estis sendantaj la artikolojn nur fine de monatoĵ. Pro tio nia redaktoro devis interrompi la kompostadon de la gazeto, kaj sekve ĝi aperis kelkajn tagojn poste. En Leipzig ni ekzemple havas pli ol 50 geabonantoĵ, kiuj kutime ricevas la gazetojn en la monataĵ kunvenoj, kaj por la administranto ne estas facile trankviligi la animojn, kiam ili ne estas venintaj. Mi opinias ke la revuoj fine de monato devas esti ekspeditaj, por ke ili je la unua de nova monato estu en la manoj de ĉiu, kondiĉe ke li ne loĝas tro malproksime. La redaktoro destinu fiksan daton ĝis kiam artikoloĵ por la sekvanta numero estas akceptataĵ kaj *nepre*

riiuzu aŭ prokrastu artikolojn senditaj post ĉi tiu dato. La kunlaborantojn mi petas, sendi artikolojn kiel eble plej frue kaj lasi la decidon pri enpresado al la redaktoro. Nur se la gazeto aperos akurate ni povas garantii pluan sukceson.

W. K.

E. S. F. I. O.

Kunveno de la 16an de Marto 1913. — La grupo notis kelkajn novajn aliĝintojn, inter kiuj Marcel Cachin, urbkonsilanto de Parizo.

Pierre Loti, ano de la Franca Akademio, respondis al nia letero pri lia defendo de la Turkoĵ: „Tre kortuŝita, mi dankas korege ĉiujn anojn de via Asocio, kiuj partoprenis vian amikan leteron.”

La protesto de la Esfio kontraŭ la alilokigo de la Kapitano Cacouault estas presita en kelkaj gazetoĵ.

La sekretario internacia de la Centra Oficejo de la Esperantista Federacio hungara de la Internaciista Organizaĵo, de Budapeŝt sciigas nin, ke tiu asocio decidis aliĝi kun ni kaj prenis nian regularon.

Kamarado legas interesan leteron de la Federacio de la departamento „Gard” (kies Jaurès estas deputato). Tiu federacio petas sciigojn pri Esperanto. Sciigojn kaj broŝurojn ni sendos.

Esfio decidas sendi delegiton al la 2a kongreso de la Germana Laborista Asocio. Tiu delegito (K-do Senrono) estas komisiita por fari raporton pri la projekto de Federacio Internacia. Li iras al tiu kongreso kiel delegito de la gazeto „Humanité”.

Posttagmeze, la kamaradoĵ kuniris al La Pré-St. Gervais kaj partoprenis la publikan protestadon kontraŭ la projekto pri la trijara militservo.

La kunveno de Aprilo okazos Dimanĉon 20an de Aprilo.

La sekretario SENRONO.

Lingvaj aferoj.

Mi ne deziras tie ĉi kritiki kiun ajn, ni penis por lerni Esperanton, kaj nia scio, multpene akirita, ne estas kom-

parebla al tiu de profesoroj, lingvistoj aŭ aliaj verkistoj.

Des pli ni starigis niajn esperojn sur Esperanto, tial ke ĝi estas facila. Ni devus esti tiuj, kiuj plej zorge atentis la simplecon de nia interkomprenilo. Kial, kontraŭe, nia revuo estas plena je vortoj, kiujn ni ne komprenas ĉiam, aŭ almenaŭ kiuj estas duoblaj kun aliaj? tio komplikas multe la aferon.

Mi citas la deziron ŝanĝi la finigon de landoj: Ĉu Aŭstrio estas pli simpla ol Aŭstrujo, Italio pli ol Italujo aŭ Itallando, dum oni konservas Finnlando, kial ne Finnio? Skotlando, kial ne Skotio? Holando = Holio, kiu rekonus tiujn lastajn landojn?

Estas fundamento, garantianta al ni interkomprenon, kial formordeti ĝin?

Aliaj vortoj ne estas sufiĉe atentataj, kamaradoj: kvereli, espluati, eksplati, k. t. p. La junaj lernantoj demandas: kial tiuj vortoj troveblaj en nenia de mi vidata vortaro? Kelkaj vortoj estas diveneblaj, sed aliaj estas tute ne tiaj.

Ni faru nian revuon kiel eble plej bonan, zorgante pri niaj vortoj, pri niaj esprimoj.

Ŝanĝo de vortoj ne estas laŭ mia opinio imitinda ekzemplo, ni kreu novajn vortojn se estos nepre bezone, sed nur nepre.

Ĉu ni povus interkonsenti, gekamaradoj, la fundamento ĉe la mano?

A. PANLOU.

KORESPONDADO.

Anglujo: K-do W. Dale, 23a, Manleverer Road, Brixton, London, dez. kor.

Nederlando: K-do Jan Smitz, 16-jara, Nassaukade 332, Amsterdam, dez. kor.

Aŭstrio Bohemujo: K-do Rud. Fischer, Theresieng. 16, Teplitz, dez. interŝanĝi il. pk., precipe kun fraŭlinoj.

Francujo: dez. kor.: Koaquet, 37 Rue des Cascades en Paris (20e); Driot, 42bis Rue Sorbier en Paris (20e); Georges Lecrux, soldato telegrafiisto 2a kompanio au Mont-Valérien (Seine, Francujo) dez. koresp. kun svisaj kaj belgaj kamaradoj; F-ino Jonas, 56 Rue des Cascades en Paris (20e); J. Wiedemann, 63 Avenue Philippe-August en Paris (11e) dez. interŝanĝi ilust. poŝtk., poŝtm. sur la flanko de la bildoj.